

Redakta noto

kaj denova alvoko al potencialaj aŭtoroj

Per tiu ĉi jaro 2001 komenciĝas la tria jarmilo de la kristana erao. Ekzistas ja multaj aliaj kalkuloj de la tempo, sed la kristana havas la plej mondvastan distribuon. Ĝi validas de la jaro 532, kiam la scita abato Dionizo Ekziguo (*Dyonysius Exiguus*) komisiite de papo Johano I-a tutnove prikalkulis la paskajn ciklojn. Sed ĝi bezonis jarcentojn ĝis "fina venko" por ĝenerala akceptado kaj uzado.

La kristana tempokalkulo estas la sola, kiun oni nombras *kaj* reen *kaj* antaŭen kun deirpunkto de fiksa centro, nome la naskiĝo de Jesuo Kristo. De tiam disdividiĝas la tempokalkulo en jaroj "post Kristo" (p.K.) kaj "antaŭ Kristo" (a.K.). Ĉiuj aliaj kulturoj, popoloj kaj religioj komencas sian tempokalkulon per certa okazaĵo, kaj de tie nur antaŭen kalkulas. Ĉe la japanoj ekz. nova tempoperiodo komenciĝas kun nova imperiestro. La judoj komencas kun la "kreado de la mondo" kaj nun vivas en la jaro 5761. Por muzulmanoj la komencpunkto estas la fuĝo de Mahometo en la jaro 632 kaj sekve ili jam ne atingis la trian jarmilon, kiu mondvaste komenciĝis je la 1-a de januaro 2001. Ankaŭ tie, kie oni tradicie kalkulas diverse kaj vivas kun du diversaj datoj. Por ni, la kristana tempodifino estas tiom memkompreneble, ke ni uzas la mallongigon "a.K." por diferencigo de la antaŭkrista tempo, sed la mallongigon "p.K." (kiun antaŭaj generacioj kiel niaj geavoj tutĝenerale metis post la jardato) ni tute ne plu uzas. Ni vivas en la jaro 2001 kaj ne bezonas skriban klarigon, ke estas "post Kristo". Sed ni tamen ne forgesu, kun kies naskiĝo komenciĝas nia nuna tempokalkulo kaj kiu akompanis nin ĝis nun, kaj kiu akompanos nin ankaŭ tra la trian jarmilon.

La verkistoj de la artikoloj en tiu ĉi SR 1/2001, kiuj kontribuis per naturhistoria traktaĵo (*Kavka*), per filozofia verko (*Bociort*), per psikolingvistika prijuĝo (*Nagata*) kaj per medicina temo (*Gunther*) alvokas ĉiujn kapablajn ISAE-anojn, kontribui al la 52a jarkolekto de Scienca Revuo per interesa proprafaka manuskripto por montri al la publiko, ke Esperanto vivas kaj kiom grave internacilingva scienca revuo kontribuas al mondvasta komunikado inter fakuloj el ĉiuj sciencaj kampoj. Restu fidela al nia asocio, kara leganto kaj ISAE-ano, kaj subtenu nian agadon per daŭrigo de via membreco kaj via propra aŭtoreco!

R. Sachs, prezidanto de ISAE

Esperantigo de germanaj nomoj, precipe por la bezono naturhistoria

Josef KAVKA

Enkonduko

Pri propraj nomoj en Esperanto ekzistas abunda literaturo. La koncernaj aŭtoroj sintenas al la problemaro tre diversmaniere. Ekstremaj starpunktoj estas unuflanke: lasi la nomojn en Esperanto-tekstoj originalformaj, duaflanke: asimili ĉiujn proprajn nomojn konforme al la lingva strukturo de Esperanto, t.e. respekti la regulojn de ĝia fleksio.

La unue menciita ekstremo estas neakceptebla jenakiale:

1. La nelatinskribaj nomoj ne povas resti originalformaj, dum ties transskribo renkontiĝas kun apenaŭ venkeblaj problemoj.
2. La sciencaj terminologioj kaj nomenklaturetoj nepre postulas formojn fleksiajn.

La dua ekstremo ofte vekas mokadon, kvankam ĝi estas bonintenca kaj plene akordiĝas kun la zamenhofa lingvo. Ĉi-konekse, oni devas aprezi la iniciaton de Rikardo Ŝulco, kiu en pluraj libroj prezentis sian solvon (i.a. 1985). Ne ĉiam eblas konsenti kun li: evidente li trotaksis la prononcismon, kiu eble konvenas en beletro, sed ne en lingvo scienca. Mi provu demonstri tion per abundaj ekzemploj el ĥemio, mineralogio, petrologio, stratigrafio, paleontologio, botaniko, zoologio kaj geografio. Kun la fama d-ro *Pump*, la eksterordinare talenta lingvisto, mi laboris super "Poŝatlaso de la Mondo" (1971). La principojn de asimilado de geografiaj nomoj tieaj ni eksplikis en Scienca Revuo (1972). En la sama revuo mi okupis min pri esperantigado de la loknomoj ĉeĥoslovakaj (1978). Pri onomastikaĵoj sciencaj mi skribis en 1981. Tiam mi atentigis, ke la mineralojn oni estis nominta plejparte (56%) laŭ personoj aŭ trovlokoj. Simila situacio estas en botaniko kaj zoologio, paleobotaniko kaj paleozoologio. Inter la nomoj de la ĥemi-elementoj, 41% estas laŭ personoj aŭ lokoj. Evidente, en la ĵus nomitaj kaj aliaj sciencoj ne eblas evitadi asimiladon de propraj nomoj.

La problemaron ligitan kun asimilado de germanaj nomoj mi pritraktu laŭ la vicordo de la germana alfabeto, tamen aparte por la konsonantoj, aparte por la vokaloj. La motivo al la aparta traktado montriĝos pli poste.

1. Konsonantoj

1.1. CH = Ĥ

Mi komencu per la velara fonemo Ĥ, kiu en la germana ortografio aperas digrame: *CH*. Ekzistas pli ol 50 Ĥ-mineraloj nomitaj laŭ personoj aŭ trovlokoj (*Kavka*, 1997). Jen almenaŭ kelkaj: abihito laŭ la geologo *G. Abich*, aŭerbaĥito laŭ la mineralogo *I.B. Auerbach*, blumenbaĥito laŭ la kuracisto *J. F. Blumenbach*, buĥolcito laŭ la ĥemiiisto *J. Bucholz*, buĥvaldito laŭ la metalurgo *V. Buchwald*, fiĥtelito laŭ la bavaria montaro *Fichtelgebirge*, kolĥenito laŭ la trovloko *Kochental* en Aŭstrio, lengenbaĥito laŭ la svisa urbo *Lengenbach*, puĥerito laŭ la saksia minejo *Pucher*, ŝapbaĥito laŭ la ŝvarevalda trovloko *Schapbachtal*. Ankaŭ rokaĵoj estas nomitaj, sed pli ofte laŭ trovlokoj ol personoj: alsbaĥito laŭ la trovloko en *Odenwald*, buĥnito laŭ tiu ĉe *Fulda*, durbaĥito laŭ tiu en *Schwarzwald*, *Achtaler Grünsandstein* estas aĥtala verd-sabloŝtono k.t.p.

Sennombraj fosili-specioj portas nomon de persono aŭ trovloko: *Acidaspis buchi*, *Goniatites* kaj *Anarcestes*, ambaŭ wenkenbachi. *Chemnitzia escheri* estas ekzemplo por genra nomo laŭ la trovloko, specia epiteto laŭ la persono. Fine mi tuŝu almenaŭ du plantnomojn kun *CH*: kolĥio laŭ la botanikisto *Koch*, fuksio laŭ la botanikisto *Fuchs*. La lasta ekzemplo demonstras, ke *CH* laŭprononce ne estas la velaro Ĥ, sed la plozivo K. En PIV estas trovebla ne sole fuksio, sed ankaŭ fuksino, la ruĝaĵo anilina. Simile, la grupo *CHS* redoniĝas per KS en la nomo Saksio, sed tio estas okazoj esceptaj. Mankus motivo apliki la misfaman K-modon en la okazoj pli supraj. Apenaŭ mi komprenas, kial *München* estas en PIV prezentita kiel Munkeno, kvankam *Zamenhof* lanĉis Munĥenon, pli fidelan al la germanaj prononco kaj skribformo.

1.2. CK = K

Evidente senproblema estas la germana konsonant-duopo *CK* prononcata kiel K. Tial do la cefalopodo-fosilio *Ammonites beckeri* fariĝas en Esperanto : amonito bekera. La planto nomita laŭ la grafo

Bismarck estas bismarkio, *Rostock* estas Rostoko, *Frederick* estas Frederiko (laŭ *Zamenhof*), *Mecklenburg* donis nomon al Meklenburga golfeto, la kvaternaran interglacialon oni nomis: meklenburgio. Ĉi-okaze mi menciuj la latinan botanikan epiteton *megalopolitanus*, kiu esperantiĝas simple: meklenburga.

1.3. DD = D, DT = ?

Generiĝas problemoj kun *DT*. Ĉar laŭ la fama natursciencisto *Alexander Freiherr von Humboldt* estas nomitaj fosilioj, ekz. *Ammonites*, *Clymenia* kaj *Gymnites humboldti*, aŭ la pingveno (mi preferus: pingvino, kp. *Kavka*, 1996), oni povas heziti, ĉu lasi *DT*, ĉu elimi *D*, ĉu *T*? Por la lasta solvo pledus Esperanta Bildvortaro (1988) de *Eichholz*, la kanada germano: Humbolda fluo. Analoge, laŭ la ĥemiisto *Brandt* nomita mineralo havus la nomon: brandito. Da germanaj nomoj kun *DT* ekzistas ja pli. Jen ankoraŭ ne pli ol unu, por ne trovastigi nian traktadon: *Grünwaldt*.

1.4. FF = F

Do, la trilobito *Elipsocephalus hoffi* estas en Esperanto: elipsocefalo hofa, *Chelone hoffmanni*: ĥelono hofmana. La mineralo gersdorfito havas sian nomon laŭ la iama posedanto de la aŭstria erkuŝejo *Gersdorff*.

1.5. H, kiu estas prononcata

troviĝas ekz. en la botanika genronomo hakeo, nomita laŭ la plantamiko *Hake*. Aliflanke, en la virinnomo *Hertha*, la komenca *H* estas prononcata, sed ne tiu post *T*. La genronomo velthejmio, nomita laŭ la botanikisto grafo *Veltheim*, tamen havas prononcatan *H*, kvankam post *T*. Ja temas pri kunmetita vorto *Velt-Heim*. Aliflanke svarmas nomoj kun la muta *H*: *Luther* = Lutero, *Berthold* = Bertoldo k.t.p. Jen kvin fosiliaj cefalopodoj: *Ammonites* kaj *Aspidoceras uhlandi*, *Ammonites uhligi*, *Gastrioceras* kaj *Goniatites kahrsi* = goniatito karsa. Fine unu ekzemplo el la klaso eĥiderma, nome la krinoido *Encrius brahli* = enkrino brala.

1.6. KK, LL, MM, NN, PP

senprobleme fariĝas simplaj: *Burchellia*, *Gillenia halensis* (unusola *L* jam en la latina adjektivo, kvankam ĝi devenas el *Halle*), *vallesi*

acus (jen restis *LL* laŭ la svisa kantono *Wallis* - en Esperanto, la epiteto devus esti: valisa). *Cidaris forchhammeri*, *Harpides grimmi*, *Pommern* = Pomerio, sekve ankaŭ *Pomera* golfeto; la mineralo *ramelsbergito* estas nomita laŭ la germana mineralogo *K.F. Rammelsberg*, anabergito laŭ la saksia trovloko *Annaberg*. *Ardenne* estas Ardenoj; la planto nonco ricevis la nomon laŭ d-ro *Nonne* el Erfurto, la mineralo johanito laŭ la aŭstria mineralogo *Johann*, la fosilio *Kepplerites* laŭ la fama astronomo, zipeito laŭ la aŭstria mineralogo *Zippe*, kiu naskiĝis en la nordbohemia *Dolní Falknov*, distrikto *Decín*. Ankaŭ Rikardo Ŝulco, la fama pledanto por asimili proprajn nomojn, nepre kontraŭstaris duobligon de konsonantoj. En sia romantraduko li esperantigis *Hochkeppelstrasse* per *Hofikepelstrato*.

1.7. PH = F

La mineralo stefanito havas nomon laŭ *Stephan*, la aŭstria eregeologo. Ĉi-loke menciindas, ke la nova germana ortografio allasas skribi *F* anstataŭ *PH*, ekz. *Grafit* anstataŭ la malnova *Graphit* (*Barrandovská-Frank*, 1997).

1.8. Q = KV

Quedlinburger Mergel = kvedlinburga marno.

1.9. RR = R, SS = S

Ostrea knorri = ostr(e)o knora, *Knorria imbricata* = knorio enbrikata. Laŭ la germana paleontologo *Goldfuss* estis nomitaj pluraj fosilioj, ekz. la koralo *Favosites*, la triasaj moluskoj *Gervillea* kaj *Nucula*, la pliocenaj praelefantoj *Aceratherium*, *Chelicotherium* k.t.p. Do, la latina epiteto *goldfussi* estas esperantlingve: goldfusa.

Aliflanke, la germana litero *S* kaŭzas malfacilaĵojn en Esperanto. Mi prenu kiel ekzemplon la nomon *Sandberger*. Germane oni prononcas *Z*, sed internacie restas *S*, precipe, se temas pri okazo komenevorta. *Arca*, *Goniatites* kaj *Nerita*, ĉiuj tri kun la specia epiteto *sandbergeri*, apenaŭ povas esperantiĝi alimaniere ol: sandbergera.

Cetere, mi referencu al la pli supre menciita Saksio, zamenhofe Saksujo, kvankam ĉe Rikardo Ŝulco troviĝas la familia nomo *Sachs* en la Esperanto-formo: Zakso. Ĉu la ĵus nomita aŭtoro voĉdonus por "zaksofono"? Pri la dubinda prononcismo estas skribite jam antaŭe.

1.10. Problemeĉaj estas la konsonantan-duopoj *LS*, *MS*, *NS*. La plant-specia epiteto *alsaticus*, germane *elsässisch* povus apogi sin sur *PIV*, tamen iom enigme: Mi trovas tie *Elzaco* = *Alzaco*, sed ne la lastan formon sub *A*; tamen, *PIV-Suplemento* (1987) difinas *Alzacon* kiel "regionon en Francio, kun plejparte germana dialekto". Konsekvence, la latina adjektivo *sonus* en Esperanto: alzaca, t.e. kun la voĉa *Z*.

La konsonantan-duopo *LS* = *LZ* povus fariĝi precedento por pli da onomastikaĵoj, ekz por la plantnomo *brunfelzio*, nomita laŭ la botanikisto *Brunfels*. Analoge, en petrologio ekzistas *felzito*, *felzofira* k.a. La mineralo *bunsenito* (laŭ *Høeg*, 1988) portas sian nomon laŭ la ĥemiisto *Bunsen*. Do, kiel trakti tiun *NS*? Ĉu alimaniere ol *LS*?

Kaj kiel trakti *Ammonites* kaj *Halorites ramsaueri*? Ĉu ramsaŭeraj, ĉu ramzaŭeraj? Se *S* en germana originalo troviĝas intervokale, ekz. en la nomo de la fama petrologo *Rosenbusch*, tiam la Esperanto-mineralnomo povus soni: rozenbuŝito.

1.11. Samtempe, la lasta ekzemplo servas por *SCH* = Ŝ:

Ammonites emscheri estas suprakretacea cefalopodo (emŝerio estas la koncerna stratigrafia termino), *Gryphaea* kaj *Melanatria escheri*, *Ammonites fischeri*, la mineralo *hibŝito* (laŭ la petrologo *J.E. Hibschi* mapinta Bohemian mezmontaron), la karbonia filiko *Neuropteris schlehani*, la suprakretacea fosilio *Acanthohoplites schmidtii*.

Eĉ ekzistas planto eŝŝolcio (kun duoblaĵo *SCHSCH*), nomita laŭ la kuracisto-vojaĝisto *J. Eschscholtz*. Similan nomon havas alia planto, nomita laŭ la kuracisto-botanikisto *L. Elsholtz*, sed ĉi-okaze neniel temas pri la digramo *SII*. La nomon oni devas interpreti kiel kunmetaĵon *Els-holtz*, do la plantnomo en Esperanto estu elsholcio. Ĉe Laĥa lago troviĝas rokaĵo ŝorenbergito, nomita laŭ la trovloko *Schorenberg*.

Mi finu *SCII* per jenaj du fosilioj: *Alaria schweinfurthi* kaj *Halitherium schinzi*. Malfacilaĵoj aperas pri *SP* kaj *ST*. La germanoj foje prononcas Ŝ, foje *S*. La Esperanto-formoj devus konservi *S* precipe, se temas pri la vortkomenco: la mineralo *spesartino* kaj la magmorokaĵo *spesartito* estas nomitaj laŭ la bavaria *Spessart*; la mineralo *sternbergito* kaj la planto *sternbergio* ricevis siajn nomojn laŭ la grafo *Kaspar Moritz Sternberg*, la belflora *strelcio* laŭ la meklenburga princino *von Strelitz*.

Menciindas ankaŭ la mineralo *stasfurtito* kaj la fosilioj *Cyclolobus stachei*, *Neohibolites strombecki* kaj aliaj.

1.12. *TT* = T

Ammonites metternichi = amonito meterniĉa. (Parenteze mi menci, ke la latina plantnomo *Knautia* estas erare prononcata kun C, kvankam ĝi havas nomon laŭ la botanikisto *Ch. Knaut*. La eraron motivas la fonetiko latina: *TI* plus vokalo.

1.13. *TSCH* = Ĉ

Laŭ la vojaĝisto-kuracisto *J. Bartsch* estas nomita la planto barĉio (*Bartschia*); laŭ la direktoro de la berlina botanika ĝardeno *G. Gleditsch* ricevis sian nomon la grimp-arbedo glediĉio (PIV).

Jen kvar fosiliaj moluskoj: *Ammonites fritschii*, *Cardita*, *Murex* kaj *Oncophora partschi*. La mineralo ĉermakito portas la nomon laŭ la aŭstria ĉefdevena mineralogo *Tschermak*.

Memkompreneble, ne ĉiu *TSCII* prononceiĝas Ĉ: ekz. *Cepaea gottschicki* = cepeo gotŝika, *Medlicottia trautscholdi* = medlikotio traŭŝolda.

1.14. *TZ* = C

La rokajo kacembukelito baptiĝis laŭ sia trovloko *Katzenbuckel*, la planto kaj la samnoma fosilio *Mentzelia* laŭ la brandenburga kuracisto-botanikisto *Mentzel*. La devonia trilobito *Bronteus dormitzeri* = bronteo dormicera.

1.15. *V*?

Kvankam *V* estas prononcata F, apenaŭ estus pravigebla tiom drasta interveno en la Esperanto-skribformon.

Ne mirinde do, ke Ŝulco & Bermanno (1989) esperantigis la familian nomon *Voigt* per Vokto (oni preterlasu la strangaĵojn *OI* = O, *G* = K).

1.16. *W* = V

La mineraloj ŝvacito kaj vitilfenito nomiĝas laŭ la tirola *Schwaz* kaj laŭ la germana urbo *Wittichen*, la planto vulfenio kaj la mineralo vulfenito laŭ la profesoro *F. Wulfen* el *Klagenfurt*.

La terciara praelefanto *Chalicotherium wetzleri* = ĥalikoterio veclera, la cefalopodo *Ammonites wenzeli* = amonito vencela.

1.17. *X* = KS

La palmo *Maximiliana* = maksimiliano estas nomita laŭ *Maximilian Josef*, la reĝo de Bavario. La familia nomo Markso (*Marx*) estas registrita en PIV kaj dokumentita en multaj esperantajoj.

1.18. *Z* = C

Tio troviĝas en multaj okazoj, ekz. *Salzburger Becken* de la supra kretaceo estas Salcburga baseno. En botaniko oni renkontas du latinajn adjektivojn: *salinus* kaj *salisburgensis*, t.e. salcburga. La saman signifon havas la latina genitivo plurala: *noricum*, laŭvorte esperantigenda: "de la salcburganoj". Laŭ *Koblenz*, stratigrafoj nomis koblencio - etaĝon de la malsupra devonio. Harcburgito estas rokajo, *Conocoryphe sulzeri* trilobito, *Goniatites holzapfeli* kaj *Ammonites rebholzi* cefalopodoj. La plantspecio tabernaemontanus signifas germane: "*aus Bergzabern in Rheinpfalz*", do esperante: bergcaberna.

Tamen, iuokaze oni hezitas: ekz. la mineralo nomita laŭ la vojaĝisto *Joseph Alexis Stolz* el Bohemio estas stolcito ĉe *Høeg* (1988), dum mi inklinus pli eble al stolcito aŭ eĉ ŝtolcito. Plej diskutinda estas *Z* komenevorta: *Zinnia*, laŭ la profesoro el *Göttingen* estas registrita en PIV kiel zinio. Analoge, *Halobia zitteli* estus halobio zitela. Pli supre mi menciis zipeiton, kiam temis pri la germana *PP*. Plej bedaŭrinda estas la urbo *Leipzig*: mi renkontis Lajpcigon, Lejpcigon (tiu plaĉas al mi), eĉ la latindevenan formon Lepsiko (PIV), onidire zamenhofan...

2. Vokaloj

Mi venas al la vokaloj, kiuj estas sendube pli problemriĉaj ol la konsonantoj.

2.1. *AA* = A

Aĥieno, la iama kortegurbo de Karolo la Granda, estas trovebla en PIV: *Aachener Sattel* = aĥiena "montoselo", t.e. intermonto estas geologia termino koncernanta triason, la mezozoikan periodon, dum alenio (laŭ *Aalen*) koncernas ĵurason, nome dogerion. Laŭ la paleontologo *Fraas* estas nomitaj nemalmultaj fosilioj, ekz. la triasa *Triglyphus*, la terciara *Palopterium* kaj la kvaternara popolo *Populus fraasi*. Simile, *Waagen* aperas en fosiliaj epitetoj *waageni* = vagena. *Saarbecken* estas la triasa Sarbaseno.

2.2. $AE, \bar{A} = A$

Jen problemo pri la t.n. "umlaŭto" aŭ alie dirite "ŝanĝvokalo". Kiel precedento povus servi Karintio (*Kärnten*) trovebla en PIV. La germanan adjektivon *kärntnerisch* latinigis la botanikistoj malsame: *carinthiacus*, *carnicus*, *carniolicus*, tamen ĉie konservinte A.

Do, kion juĝi pri tio, ke Ŝulco esperantigis la komponiston *Händel* per Hendelo, sed la virinomon *Käthe* per Kajtino? Al la konservo de A kontribuas ankaŭ la fakto, ke la umlaŭto aperas kiel signo de pluralo, do ke la normala germana radiko, t.e. la singulara, havas A. Cetero estas konate, ke \bar{A} devenas de AE , kie la frakturano \bar{n} oni skribis unue post A, pli malfrue super A. El tio fine restis aŭ du komoj, aŭ du punktoj.

Konsekvenca, la fosilioj nomitaj laŭ *Jackel*: *jackeli* = *jakela*, laŭ *Jaeger*: *jaegeri* = *jagera* havus sian originan A, same kiel *kampferio* el zingiberacoj, nomita laŭ la germana kuracisto-vojaĝisto *Engelbert Kaempfer*, nagelio laŭ la munĥena botanikisto *Nægeli*. La triasa etaĝo *rhätische Stufe* estu ratio. Tamen, PIV nomas la romian provincon, respondan al la orienta Svislando kaj Tirolo: Retio. Ĉio ĉi dokumentas, kiom distance Esperanto troviĝas al stabiliĝo de la asimil-meĥanismoj.

2.3. $AI, AY = AJ$

Bonŝance, ankaŭ senproblemaj punktoj renkontiĝas: Frankfurto ĉe Majno, la mineralo hajdingerito laŭ la mineralogo *Wilhelm Karl von Haidinger* (al Aŭstrio), same la moluskoj *Mytilus haidingeri*, *Nucula Mayeri*. Laŭ la paleontologo *Kayser* estas nomitaj *Congeria*, *Dechenella*, *Enteles* kaj aliaj (*kayseri*).

2.4. $AU, \bar{A}U = A\bar{U}$

La latina speci-epiteto *augustanus* signifas, ke la planto devenas el la ĉirkaŭaĝo aŭgsburga, dum hagenaviensis indikas Hagenauon sudoriente de Homburgo. Plaŭenito estas plutona rokaĵo, speco de sienito, nomita laŭ la saksia *Plaßen*.

Gaŭsbergito estas crupcia rokaĵo el la antarktia vulkano de Vilhelmlando, dum maŭherito estas mineralo ricevinta sian nomon laŭ la min-inĝeniero *W. Maucher* el Munĥeno, kaj baŭmhaŭerito laŭ la ĥemiisto kaj mineralogo *H.A. Baumhauer* (Frejburga Universitato). *Aargauer Insektenmergel* troviĝas en la svisa liasio, t.e. malsupra juraso, do: argaŭa insektomarno.

Mi nomu ankoraŭ trion da ekzemploj ĉi-koncernaj: *Antilope haupti*, *Odontochile hausmanni*, *Nilssonia schauburgensis*. Tamen ekzistas esceptoj: la latina *lusaticus*, t.e. *von der Lausitz* estas luzacia kaj *Braunschweig* fariĝis la zamenhofa Brunsviko. Sed laŭ *Herzog von Braunschweig* ricevis sian nomon Brunsvigia, do restas diskrepanco inter la zamenhofa K kaj la botanika G.

Pri $\bar{A}U$: La fosilia filiko *Sphenopteris bäumléri* estus sfenopterido baŭmlera, spite al la ŝulca Ŝtrojbledo (*Sträubleder*).

2.6. $E = \bar{E}$

Kial? Ĉar *E*, en la germana prononco ofte ellasata, tamen restas en Esperanto: Jam supre mi menciis la urbon Alieno. Same, *Regensburg* fariĝas ne Regnsburgo, sed Regensburgo; dum la mezozoika juraso ekzistis Regensburga golfo.

Eble interesos vin, ke la latinaj adjektivoj en botaniko estas: *ratisbonensis* kaj *ratisbona* = regensburga. La mondfama litografia kalkoŝtono, en kiu la paleontologoj trovis la prabirdon arĥeopterigon, estas la solenhofena, kvankam apud la formo *Solenhofen* ekzistas ankaŭ la formo *Solnhofen*. La konsonanta grupo -LNH- estus iom malfacila por esperantistoj. *Goniatites enkelbergense* = goniatito enkelberga.

2.7. $EE = E$

Lcersia = lersio. Tiun ĉi planton oni nomis laŭ la apotekisto *Lcers* el *Herborn*, sudokcidente de *Marburg*. Laŭ *Beerbach* (*Odenwald, Harz*) oni nomis etgrajnnan gabron: berbaĥito.

2.8. $EI, EY = EJ$

Por tio troviĝas en Esperanto bonaj precedentoj: gnejso, Rejno (sed la latina adjektivo estas: *rhenanus*). Do, la stratigrafoj povas paroli pri la otvejlera etaĝo de la supra karbonio en la sar-rejna regiono. Analoge Lejpcigo (vd. pli supre, sub Z). La latinaj adjektivoj estas: *lipsicus*, *lipsiens*, *lipsiensis*. Ĉi-loke mi menciis ankaŭ, ke la latina adjektivo *friburgensis*, t.e. frejburga, koncernas la urbon *Freiburg im Breisgau*.

Laŭ la harca *Weisselberg* estas nomita la vulkanaĵo andeziteca: vejsselbergito. Multaj fosilioj ricevis sian nomon laŭ la fama paleontologo *Geinitz*: *Geinitzia cretacea*, *Ancella*, *Eucalyptus*, *Holcoscaphtes* kaj *Scaphites geinitzi*. La braĥiopodo *Rhynchonella geinitziana* = rinĥonelo gejnica.

Jen tri mineraloj: ejlbergito (laŭ la aŭstria urbo), frejbergito (laŭ la mondfama minurbo en Saksio), frejeslebenito (laŭ la germana, ree saksa, mineja komisaro *Johann Karl Freiesleben*). La planto ejlhornio ricevis sian nomon laŭ la prusia lernejministro *J.S.F. Eichhorn*. La latina *isenacensis* = ejsenalia (laŭ la urbo *Eisenach* en Turingio), *vochinensis* = volĉejna (laŭ *Vocheiner Alpen*). Eblus elnombri centojn eĉ milojn da natursciencaj onomastikaĵoj kun la germana *EI*, sed mi finu per unusola ekzemplo el ĥemio: La elemento n-ro 99 estas eĉnŝtejnio kun eĉ du *EI*. Neniu ĥemiisto-esperantisto ĝis hodiaŭ aŭdacis lanĉi "ajnŝtajnio", kiu ja pli bone redonus la germanan prononcon, sed neallaseble difektus la internacie konatan skribformon.

Jen kial mi ne povas konsenti kun mia karmemora amiko Ŝulco, kiu esperantigis *EI* per AJ: *Einbeck* = Ajnbeko, *Eichendorff* = Ajlĥendorfo, *Steiner* = Ŝtajnero k.t.p. Tamen, ne ĉiam *EI* estu EJ: *Holstein* = Holstinio (zamenhofa), *Steiermark* = Stirio (la latina botanika adjektivo estas: *stiriacus*). Fine pri *EY* = EJ: Laŭ la paleontologo *Beyrich* nomiĝas multaj fosilioj: *Actaeonella*, *Arethusina*, *Cepaea*, *Comus*, *Cypraea*, *Macrodon*, *Nucula*, ĉiuj kaj aliaj: *beyrichi*. *Goniatites beyrichianus*, *Homoceras beyrichianum*. Ankaŭ ekzistas genronomo *Beyrichia* = bejrilĥio. Aliaj fosilioj havas la speci-epiteton *keyserlingi*, *meyni*, *speyeri* k.t.p. Laŭ la germanaj ĥemiistoj nomiĝas la mineralo *Meyerhoffert* kaj *Stromeyerit*. *W. Meyerhoffert* famiĝis pro sia sintezado de mineraloj; *F. Stromeyer* el *Göttingen* faris la unuan ĥemian analizon de mineralo.

2.10. EU = EŬ

spite al la ŝuleca OJ, kiu redonas la germanan prononcon. La germana skribformo ja tre internaciigis, do ne mirinde, ke en PIV troviĝas la virnomo Eŭgeno kaj la familia nomo de la genia kuracisto, la malkovrinto de la subkoncio: Freŭdo. En Bohemio famiĝis la germana geologo *Reuss*, do la fosilio *Heteroceras reussi* = heterocero reŭsa.

Per la romano de *Karel Čapek* famiĝis la salamandro *Andrias scheuchzeri*. Ĝi estas nomita, same kiel la planto *Scheuchzeria* laŭ la renoma svisa natursciencisto *Johann Jakob Scheuchzer*. La planto leŭlitenbergio havas nomon laŭ *Maximilian, Prinz von Leuchtenberg*. La fosilian cefalopodon, amoniton *Pachydiscus neubergicus* oni trovis en la alpaĵ kretaceaj sedimentoj eĉ la stiria urbo *Neuberg*. Ankaŭ ekzistas la botanika adjektivo *neubergensis* = neŭberga. *G.A.*

Zeuner estis la inspektoro de Minista Lernejo en *Freiberg*: en la vortaro de *Hoeg* (1988) estas zeŭnerito, la mineralo nomita laŭ tiu saksia eminentulo.

2.11. IE = IE

Jen aparte diskutinda afero. La zamenhofa Vieno servas kiel modelo, sed germanprononce restas la sola *I*. Ja estus kurioze nomi tiun ĉi aŭstrian metropolon "Vino", kvankam la fama valso de *Johann Strauss* estas: *Wein, Weib und Gesang*. Aliflanke, en PIV troviĝas dizelo, la motoro nomita laŭ *Diesel*. Jen ni staras antaŭ grava dilemo, ĉu preferi la internacian skribformon, ĉu la germanan prononcon. Ŝulco memkomprene voĉdonis por la prononco, do ekz. *Sigfrido*. La tradukintoj de "Poŝatlaso de la Mondo", t.e. d-ro *Pumpr* kaj mi, elektis la duan voĉon, ekz. Kiela golfo, analoge al la zamenhofa Vieno. Konsekvence, la mineralo nomita laŭ vojaĝisto *E. Riebeck* estus riebekito. Tiun ĉi formon akceptis ankaŭ *Hoeg* en sian vortaron. La botanika adjektivo *giessensis* (laŭ *Giessen*) esperantiĝus do kiel giesena.

Jen tri plantnomoj: *Dietlenbachia* (laŭ la geologo *E. Dietlenbach*, ankaŭ el Gieseno), *Nierembergia* (laŭ la profesoro el la 17a jarcento) kaj *Swietenia* (laŭ la fondinto de la viena botanika ĝardeno *Schönbrunn*, *G. van Swieten*). Laŭ la odervalda trovloko *Schriesheim* portas sian nomon la ultrabaza magmorokaĵo ŝrieshejmito. Mi menciuj ankorau *Hyalonema sieboldi* (marspongo), *Terebratula zietenii* (braliopodo) kaj *Altlicbichauer Kalkgraben*. Eŝcepta okazo estas Treviro, la germana urbo rejnlanda, originale *Trier*, kies latinaj adjektivoj estas: *trevericus* kaj *treviricus*.

2.12. OE, Ö = E

Se mi preterlasos la maloftan OO = O, mi venas al alia tre diskutinda afero. Nome, ekzistas ankaŭ precedentoj por OE, Ö = O ekz. la zamenhofa Kolonjo eĉ Rejno, originale *Köln am Rhein*. Aliflanke, laŭ la granda fizikisto *W.C. Röntgen* havas nomon la internacia unuo de radiado: rentgeno. Eĉ tria alispeca precedento troviĝas en PIV: Goeto, la plej fama germana poeto, romanisto kaj dramisto. Laŭ li estis nomita la mineralo goetito (en la vortaro de *Hoeg*), aliforme getito (en la vortaro de *Kavka*, 1981). La formo kun E estas apogita de ĉiuj slavaj lingvoj. Por pliigi la ĥaoson, mi referencu al Sulco: Johano Volfgango Degojto. Tamen *Böll* estas eĉ li: Henriko Boelo,

dum *Römer* estas Romjero. Jen tri diversaj solvoj fare de unusola esperantisto.

Laŭ la ĥemiisto, geologo kaj paleontologo *J. Böhm* estas nomita la mineralo bemito, sed bemerio estas planto nomita laŭ la vitenberga botanikisto *G.R. Boehmer*. Revenante al "Rojmero" (*Roemer*), la paleontologo, mi povas menci la speci-epiteton roemeri ĉe la graptolito *Monograptus*, ĉe la lamnbraĥuloj *Acanthoscaphites* kaj *Ostrea*, ĉe la cefalopodo *Crioceras*. Laŭ la trovloko *Dörnten* norde de *Goslar* estas nomita la jurasa dernten-ardezo, en kiu troviĝas abundaj amonitoj *Harpoceras doerntense* kaj *schroederi*. Junterciaraj estas *Juglans göpperti* = juglando geperta.

Ne eblas elnombri ĉi tie la multegajn onomastikaĵojn kun *OE*. Mi restu ĉe kelkaj plantoj: *Koeleria*, *Koelreuteria* (tiu ĉi laŭ la botanikisto el *Karlsruhe*), *Mochringia*, *Moenchia*. Jen almenaŭ tri mineraloj: *Löllingit* (laŭ la karintia urbo), *Schönit* (laŭ la germana oficisto *Schöne*) kaj *Wöhlerit* laŭ la fama ĥemiisto *F. Wöhler*. Laŭ *Gröba* en Saksio havas nomon la plutona rokaĵo.

Ne ĉiam oni estas certa, ĉu *Ö* = *E*, ekz. la mineralo *Rhonit* povus havi tri formojn, el kiuj renito malprave indikus la ĥemian elementon "renion". Fakte ĝi rilatas al la mezmontaro inter *Werra* kaj *Fulda*. La formo roenito ne estus tre konforma al la fonetiko de Esperanto. Restas la formo ronito, kiu malprave indikus la francan riveron *Rhone*, esperantlingve Rodano. Nu, esperantigo de propraj nomoj foje alportas problemon apenaŭ sisteme solveblan, ne ĉiam difin-eblan helpe de striktaj reguloj. Ateston pri tio liveras ankaŭ *Österreich* = Aŭstrio, do *Ö* = *AÜ*.

2.12. OI = OJ

Bonŝance, ĉi-okaze ne prezentiĝas problemoj. La ŝuleca formo por *Gemmelsbroich* estas Gemelsbrojĥo. Do, lia *OJ* servas ne sole por *OI*, sed ankaŭ por *ÄU*, *EU*, *OE* (Degojto). La mineralo zoisito estas nomita laŭ la aŭstria *Siegmund Zois*, *Baron von Edelstein*, kiu financis ekspedicion por kolekti mineralojn.

2.13. Ŭ = U

Dum paleozoiko, la supra karbonio, deponiĝis sedimentoj de la sarbrukena etaĝo, germanlingve *Saarbrückener Stufe*. La zamenhofa formo por *Nürnberg* estas Nurenbergo: la prononca protezo *E* estas motivita etimologie, ĉar en la 11-a jarcento la nomo estis *Nuoren-*

berg. La mezasupragermana *nuor* = roko kaj la burgo estis konstruita sur roka monto. Luneburgito estas rara mineralo aperanta en la marnoj de *Lüneburg* (laŭ *Šulco & Bermano* (1989) "Lujneburgo"). Tamen ekzistas ŝulcaĵoj neniel misformitaj: Durero, Lubeko.

Aliflanke malbonŝanca estas *Zürich*, ĉar en Esperanto vivas multaj nomformoj: Cirilĥo, Curilĥo, Curiko, Cujriĝo, Zurilĥo, Zujrilĥo, Zuriko (PIV). La nomo estas keltdevena (*dur* = akvo, do urbo ĉe akvo), romie *Turicum*. La nomo embarasas ankaŭ geologojn-esperantistojn: Kiel traduki "*Züricher Randmoränen der letzten Vereisung*". Fine, la latina adjektivo botanika: *tigurus* = *Züricher*. La mineralo *Hübnerit* estas nomita laŭ la metalurgo kaj mineja inĝeniero *A. Hübner*; *Thuringit* laŭ *Thüringen*, *Thuja thuringiaca* = tujo turingia. Turingio estas la zamenhofa nomo por la regiono en la centro de Germanio, kun densa arbarego. Pluraj fosilioj estas nomitaj laŭ lokoj tieaj: *Gümpel*, *Gürich* kaj *Münster*.

3. Rolo de la latina lingvo

Plurloke mi montris, ke *Zamenhof*, asimilante germanajn nomojn, apogis sin sur la formoj latinaj: Holstinio, Lepsiko, Stirio, Vieno k.a. Aliflanke ne eblas akcepti la praktikon okaze de multaj botanikaj adjektivoj: *berolinensis* = *aus Berlin*, *bipontinus* = *nach Zweibrücken östlich von Saarbrücken*, *bollwilleranus* = *von Bollweiler, Dorf und Gärtnerei im Elsass*, *hammoniensis* = *aus Hamburg*, *oenipons* = *von Innsbruck*, *soloniensis*, *solonicus* = *von Solona in Kärnten*, *tabernaemontanus* = *von Bergzabern*, *viadrinus* = *aus dem Odergebiet* (kp. ankaŭ *Kavka*, 1983).

Epiloge

La pacienca legantaro meritas scii, kial mi tedis ĝin per tiom abundaj ekzemploj. Jen miaj du motivoj: unue mi celis - laŭ mia modesta forto - helpi al sciencistoj (ne sole germanaj), kiuj bezonas esperantigi onomastikaĵojn de sia fako. Due mi sentis devon, profunde riverenci antaŭ la kontribuego de la germanaj esploristoj al la naturhistorio. Ilia merito restos eternigita en la nomoj de ĥemiaj elementoj, mineraloj, rokaĵoj, fosilioj kaj nuntempaj organismoj.

Referencita literaturo

Barandovská-Frank, V.K. (1997): *Novinky v nemeckém pravopisu*. 124 pp. *KAVA-PECH, Dobrichovice*.

- Eichholz, R. (1988): Esperanta Bildvortaro. 880 p. - Esperanto-Press, Bailieboro.
- Hoeg, T.A. (1988): *Mineralnavn (norsk, esperanto)*. 264 p. - Universitete i Oslo. *Skriiter*: 15.
- Kavka, J. (1978): Esperantigo de la ĉeĥoslovakaj nomoj. *Sci. Rev.* 29 (1978) 119-128. Ĉapeko
- Kavka, J. (1980): La fonemo Ĥ kaj ties transformoj en la internacia scienca leksikologio. - Kolekto de la seminariaj referaĵoj AEST, 93-100. *Ústí n.L.*
- Kavka, J. (1981): Onomastiko en fakterminoj konsidere ilian esperantiĝon. - Kolekto de la referaĵoj de konferenco AEST, 1, 6-14. *Zilina*.
- Kavka, J. (1981): Laŭsistema vortaro de la rokaĵomineraloj (Eo, Cs, De, Fr). - *Sci. Rev.* 32 (1981) 59-92, Pizo.
- Kavka, J. (1983): *Lingua latina versus Esperanto*. - Starto, 1, 7-8. *Praha*.
- Kavka, J. (1993): Asimilado de propraj nomoj - natura proceso en Esperanto. - Starto, 13-15. Brno.
- Kavka, J. (1996): Kontribue al PIV. Homonimoj en Esperanto, konsiderataj nomenklature. 32 p. - *KAVA-PECH, Dobřichovice (Praha)*.
- Kavka, J. (1997): Ĥ en mineralnomoj. - *Sci. Rev.*, 48, 44-51. *Eschwege*.
- Kavka, J. & Pumpl, T. (1972): Poŝatlaso de la mondo. Kontribue al geografia nomenklature en Esperanto. - *Sci. Rev.* 23 (1972) 3-27, *Beograd*
- Poŝatlaso de la mondo en Esperanto (1971). *Kartografie, n.p., Praha*.
- Ŝulco, R. (1985): Provizora regularo por esperantigo de germanaj onomastikajoj. - *Sci. Rev.* 36 (1985) 5-12, Pizo.
- Ŝulco, R. & Bermanno, H. (1989): Leksara kolekto de ofte uzataj propraj nomoj. Esperanto-Centro Paderborno.
- Waringhien, G. (1970): Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto. S.A.T., *Paris*.

Noto

Tiu ĉi teksto estas nur iomete modifita prelego "Asimilado de germanaj nomoj en Esperanton". La prelego okazis enkadre de la 43-a Kultura semajnfino en Homburgo (29-a de aprilo ĝis 1-a de majo 1994), kiun organizis Sarlanda Esperanto-Ligo.

Adreso de la aŭtoro

RNDr. Josef KAVKA, CSc.
Lužná 7 - Vokovice
CZ - 160 00 Praha 6
ĈEHIO

Priaŭtoro informo

Geologo kaj naturhistoriisto, interesata de nomenklaturetoj, ties etimologio kaj semantiko.

Pri la estetika kriteriologio de la beletro Parto II - Praktiko*

Ignat F. BOCIORT

Enkonduko

Ofte la praktiko estas pli elokventa ol ĉiuj teorioj. Tio ne kondukis nin al la konkludo ke la teorio ne gravas. Male. La grandaj pentristoj de la mezepoko asertis, ke nenio pli gravas por la praktiko ol bona teorio. Sed teorio kaj praktiko devas dialektike unuiĝi, por ke la teorio ne estu pura spekulacio kaj la praktiko ne estu blinda. Bona teorio leviĝas el la praktiko kaj returniĝas al tiu, kiel la bonfarantaj nuboj alportas akvon al la tero de kie ili naskiĝis.

Longa kaj detala analizado de la beletraj verkoj dum la lastaj jarcentoj montras racian vojon al la valoroj de la beletraĵoj kaj implicite solvas la problemon de la kriterioj. Do, ni staras antaŭ la ŝarĝo prijuĝi beletraĵon. En nia praktika ekzemplo ni prenos ne romanon sed poeziaĵon: nome la soneton ⁽¹⁾ **Protesto de K. Kalocsay**:

*Mi estas tiel laca, kiel la mont' maljuna
Kiun jam tedas teni la herbon kaj la humon,
Kaj kiu ĉi fatrasojn forŝutas, kaj la lumon
De l'suno nude sorbas per sia roko bruna.*

*Mi estas tiel laca, kiel la arb' maljuna,
Kiun jam tedas teni folian verkon, neston,
Kaj kiu de l'folioj forŝutas lastan reston
Kaj al ĉiel' sin streĉas kun la branĉaro bruna.*

*Mi estas tiel laca plu servi, flori, frukti,
Mi volus sorbi sunon, kun grandaj ventoj lukti,
Kiel la nuda monto kaj senfolia arbo.*

*Libere de utilaj kaj oportunaj sentoj,
Interparoli sole kun tiuj grandaj ventoj,
Potence kaj fantome - sentempa colharpo.*

* Parto I : Teorio aperis en *Scienca Revuo* Vol. 51 (2000) (2) p.3 - 13